La celtrafa kondutkapablo rilate BT konsistas kadre de la testo, kiun konstruis Klaus Weltner (1966) por sia metodo, en la laŭeble ĝusta diveno de la signovico de BT. La lernanto devas diveni signon post signo, ĉiam tuj ricevante la informon, ĉu la koncerna signo estas ĝuste divenita aŭ kiu signo vere sekvas. Memkompreneble la ĝusta diveno de la unua litero de la teksto estas relative malprobabla. Sed ekde tie la esplorato akiras kreskantan scion de la informenhavo de BT, kaj ankaŭ pro la lingva kohereco de la signovico BT (do: pro la stokastika interdependeco en la aperado de la signoj) li divenas ĝuste laŭ mezume kreskanta probablo. Tamen, la diveno restas hazardo, kvankam malpli kaj malpli granda, krom ĉe tekstlokoj, kie la esploranto povas esti certa, kiu signo tie troviĝas. Evidente la celtrafa kondutkapablo, en kiu konsistas la akirita kompetenteco pri BT, estas des pli granda, ju pli granda estas la nombro de la ĝuste divenitaj signoj.

Anstataŭ nepre divenigi senpere la sekvantan signon de BT, la esploranto povas diveni sinsekve la ld 32 = 5 binarojn de la kodvorto de la signo, aŭ pli ĝuste: la 5 sinsekvajn alternativojn en la irado de la kvinpaŝa vojo de la radiko de kodarbo al branĉpinto markita per unu el la 32 signoj (vd. Weltner, 1966, pj 41 - 43; Frank, 1999, p. 98). Li ĉiam tuj ricevas de la testanta esploristo (en nia kazo de enobjektigita testado: de la komputilo) la informon, ĉu la binaro estas ĝuste divenita, aŭ ĉu la alternativo estintus ĝusta. Ankaŭ en ĉi tiu klasika formo de la metodo de Weltner evidente la nombro de la faritaj eraroj F (false divenitaj binaroj) estas des malpli granda, ju pli la lernanto scias pri la (fak)lingvo uzata por BT kaj pri ties signifo, do pri L.

2.2 Informacio de teksto kaj mezuma informacio je signo

La kibernetika mezurado de la „informacio", t.e. de la informenhavo de signoj, per kibernetika mezurunuo - kutime la bito (de „binary digit") okazas surbaze de la matematika teorio de la komunikado evoluigita per Claude E. Shannon (1948). Por esti aplikebla ne nur en la telekomunikado sed ankaŭ en la antropokiberntiko, speciale en la komunikadkibernetiko (t.e. informacipsikologio, informaciestetiko, klerigkibernetiko kaj lingvokibernetiko), kelkaj ĝeneraligoj de ĝi necesis. Helmar Frank (1959a,b; vd. 1999, pj 180 - 181) enkondukis precipe la nocion de la subjektiva informacio de unuopa signo en certa situacio por unuopa subjekto - ekzemple por lernanto en certa stato de la lernprocezo. Laŭ la unua aksiomo taŭga por ĉi tiu ĝeneraligo la subjektiva informacio $i(Z)$ de iu signo (evento, fakto) Z estas skalara valoro, kiu dependas nur de ties probablo $p(Z)$ por certa subjekto en certa situacio (ekzemple: se antaŭiras en BT certa signovico, kaj se la divenanta esplorato jam havas ioman konon pri L). El kvar aksiomoj de la tiel adaptita informaciteorio sekvas, ke

(1) $i(Z)/\text{bit} = \log_2(1/p[Z]) = \text{ld}\,(1/p[Z])$ (legu: *„logaritmus dualis* de ...")

Se BT konsistus el aleatora sinsekvo de N tekstsignoj el la repertuaro de la 32 signotipoj (literoj de la hispana alfabeto kaj interspaco), tiam ĉiu tekstsigno evidente enhavus i = ld 32 bit = 5 bit, kaj BT entute $5N$ bit. Sed la literoj de la hispana alfabeto havas en hispanlingvaj tekstoj malsamajn aperprobablojn, t.e. malsaman aperoftecojn en la teksto. Tial ne ĉiuj signoj havas la saman informacion 5 bit: la oftaj havas malpli, la maloftaj pli, aritme nur H = 4,16 bit/signo. Fakte la ĝusta diveno estas iom pli facila ol kaze de egalprobableco. Ĝi fariĝas eĉ pli facila (kaj matematike pruveblas, ke la aritma informacio H plue reduktiĝas), se la tekstsignoj ne sendepende sinsekvas.

Ĝenerale kompreneble la tuta informacio i(BT) kalkuliĝas el la longeco N de BT kaj la aritmo H de la informacio de la signoj:

(2) $i(\text{BT})/\text{bit} = N \cdot H$

La klasika divenmetodo de Weltner (1966) havigas certan kvanton F da false divenitaj binaroj en la entute $5N$ binaroj de la kodigita baza teksto, kaj $5N - F$ ĝuste divenitajn binarojn. Kie okazis eraro, tie evidente mankis la scio, kiu el ambaŭ binaroj (t.e. kiu el la du pluirebloj en la kodarbo) estas la ĝusta, do mankis ld 2 = 1 bit da informacio. La esplorito do devis hazarde diveni, havante 50%an ŝancon de ĝusta diveno - do li proksimume aliajn F binarojn de la kodigita teksto hazarde (t.e.: ne pro scio!) divenis ĝuste. Entute mankis al li la informacio

(3) $i(\text{BT})/\text{bit} = 2\,F$

H do estas por li $2\,F\,/\,N$ bit/signo. (Vd. Weltner, 1966; Frank, 1999, pj 52 kaj 97).

La komputilo, en la divenprocezo de la N tekstsignoj $Z \cdot H$ fare de la lernanto, nombras la erarojn E kaj nombras la ĝustajn respondojn Z. Do la nombro de signoj $N = Z + E$. La ĝustaj respondoj en bitoj estas $Z \cdot H$ (H = 4,16 bit/signo). $Z \cdot H$ analogas al la formulo $G = P + bU$. La malĝustaj respondoj en bitoj estas $E \cdot H$. $E \cdot H$ korespondas al la formulo $M = N - G$.

Se ni supozas la bonŝancon b=1/3, la kompetenteco en bit estos $Z \cdot H - E \cdot H/2$, kiu korespondas al la formulo $P = N - U$. La malkompetenteco en bitoj estas $3/2E \cdot H = 1{,}5E \cdot H$, kiu ekvivalentas al la formulo $U = N - P$ (laŭ Frank, 1999, p. 52, b. 4,1).

2.3 Semantika informacio de teksto kaj instruaĵinformacio

Se la lernanto antaŭ la instrusituacio konas neniom de L - se lia „kompetenteco" kiel „ideala laiko" do estas 0 - tiam por li F estas plej granda. Inverse, se li konas jam la tutan instruaĵon, li tamen ne konas ties precizan vortigon en la baza teksto, ĉar eblas esprimi L diversmaniere (diversvorte kaj diversstile); tamen tia „ideala fakulo" faras la minimuman kvanton - F(fakulo) - da eraroj, ĉar BT havas por li nur „estetikan (t.e. stilan, vortigmanieran) informacion". Per la adapto de la „interna modelo" kiel procezo de lernado la laiko do reduktas la nombron F(laiko) de siaj diveneraroj al F(fakulo), tiel ke reduktiĝas la subjektiva informacio i(BT) je

$$(4)\ 2\,(F[\text{laiko}] - F[\text{fakulo}]) =: I$$

I estas interpretebla kiel informacio de la instruaĵo L, aŭ, normale (t.e. se neniom da estetika informacio estas lernenda), kiel „semantika informacio de BT". (Vd. Frank, 1999, p 97.)

2.4 La plisimpligo de la informacimezurado laŭ Klaus Weltner

Weltner sukcesis praktike simpligi sian divenproceduron, kiam li (1967) trovis altan korelacion inter H kaj la relativa nombro e de la tekstsignoj, kiujn la esplorito evidente ne antaŭvidis, ĉar li eraris pri minimume unu el la kvin binaroj de iliaj respektivaj kodvortoj (vd. Weltner, 1970). Almenaŭ por germanlingvaj tekstoj en la intervalo $0{,}1 < e < 0{,}5$ tial eblas determini la regresian linion

$$(5)\ H = 3{,}9e - 0{,}08$$

Sufiĉas do divenigi la tekston signon post signo kun tuja konfirmo aŭ sciigo de la ĝusta signo. El la nombro N de la tekstsignoj kaj la nombro $E = eN$ de ili, pri kiuj la esplorito eraris, oni povas do determini la tekstinformacion pli simple laŭ

$$(6)\ i(\text{BT}) = N \cdot H = 3{,}9E - 0{,}08N$$

ol laŭ (3), kaj la instruaĵinformacion resp. semantikan informacion pli simple laŭ

$$(7)\ I = 3{,}9(E[\text{laiko}] - E[\text{fakulo}])$$

ol laŭ (4).

La parametrojn 3,9 kaj 0,08 en la formuloj (5) kaj (6) oni determinis por germanlingvaj tekstoj. Per niaj eksperimentoj kun fakuloj kaj nefakuloj ni povas ripeti ĉi tiujn esplorojn por eventuale ĝustigi la valorojn por la hispana lingvo. La formuloj (3) kaj (4) ne dependas de la lingvo.

2.5 Kompetentecoj, lernprogreso kaj klerecinkremento

La procentaĵo de la instruaĵo L, kiun iu esplorito je iu tempopunkto t regas, estas lia kompetenteco $p(t)$ je ĉi tiu tempopunkto. Sekve $u(t)$ = 1- $p(t)$ estas la nekompetenteco. Por la ideala fakulo validas evidente u(fakulo) = 0, p(fakulo) = 1; aliflanke validas por la ideala laiko u(laiko) = 1, p(laiko) = 0. Dum la instrusituacio kreskas la kompetenteco de la lernanto ene en ĉi tiu intervalo. Se oni konas la (ne)kompetentecon je du lerntempopunktoj 1 kaj 2, oni povas prijuĝi la efikon de la instrusituacio surbaze de la lernprogreso

$$(8)\ \Delta p = -\Delta u = p_2 - p_1 = u_1 - u_2$$

aŭ surbaze de la klerecinkremento

$$(9)\ w = u_1/u_2 = (1 - p_1)/(1 - p_2)$$

(Frank, 1999, p. 53). En la kazo de ideala lernregulado, en kiu la komputilo evitas ajnan tempoperdon pro ripeto de io, kio estas jam lernita, la lernprogreso laŭ (8) estas la pli taŭga mezuro de la efiko. Ĉar en ĉi tiu kazo la lernkurbo fariĝas rekta linio, tiel ke la „pedagogia povumo", nome la kvociento $\Delta p / d$ de la lernprogreso dividite per la lerntempo d, estas konstanta. Tio ne validas por la alia ekstrema kazo, nome la ideala lernstirado, pli tipa por la tradicia instruado en klasoj aŭ per universitataj lekcioj. Ankaŭ ili ripetas, sed eĉ la jam lernitajn lernelementojn. Tial la tempoperdo kreskas, la lernprogreso malplirapidiĝas, kaj ne Δp estas konstanta dum konstanta daŭro d de la lernado, sed la klerecinkremento w. (Se la daŭro ne estas konstanta, tiam la logaritmo de w dividite per d restas konstanta.)

Ĉiukaze estas bezonata mezurado de la kompetenteco aŭ nekompetetenteco komence kaj fine de konsiderata lerntempointervalo. Oni povas mezuri p kaj u per la procentaĵo $\hat{g}$ de ĝustaj respondoj aŭ per la procentaĵo m de malĝustaj respondoj en testo postulanta respondselektojn, kiu havigas la bonŝancon de hazarda diveno b:

$$u = m\,/\,(1\text{-}b)$$
$$p = (\hat{g} - b)\,/\,(1 - b)$$

Mezurante la amplekson de L kaj la lernitan parton de ĝi per la informacimezuro (en bit), tiam u estas evidente proporcia al la informacio, kiun lernanto je certa tempopunkto t ankoraŭ devas lerni por fariĝi ideala fakulo, do proporcia al la diferenco de la subjektiva informacio de BT por ĉi tiu lernanto resp. la fakulo:

$$(10)\ u = (i[\text{BT}, t] - i[\text{fakulo, BT}])\,/\,I$$

aŭ - uzante la formulojn (3), (4), (6) kaj (7) -

$$(11)\ u = (E[t] - E[\text{fakulo}]) / (E[\text{laiko}] - E[\text{fakulo}]) = (F[t] - F[\text{fakulo}]) / (F[\text{laiko}] - F[\text{fakulo}])$$

sekve

$$(12)\ \Delta u = (E[1] - E[2]) / (E[\text{laiko}] - E[\text{fakulo}]) = (F[1] - F[2]) / (F[\text{laiko}] - F[\text{fakulo}])$$

$$(13)\ w = (E[1] - E[\text{fakulo}]) / (E[2] - E[\text{fakulo}]) = (F[1] - F[\text{fakulo}]) / (F[2] - F[\text{fakulo}])$$

La numeratoro en la formulo (12) evidente proporcias al la instruaĵinformacio lernita inter la tempopunktoj 1 kaj 2, kiun Klaus Weltner nomas „didaktika transinformacio“, Frank honore al Weltner „Weltner-informacio“:

$$(14a)\ W = 2 \cdot (F[1] - F[2]) = 3{,}9 \cdot (E[1] - E[2])$$

Ĝia maksimumo $\hat{W}$ je la komenco de la instrusituacio (tempopunkto 1), do

$$(14b)\ \hat{W} = 2 \cdot (F[1] - F[\text{fakulo}]) = 3{,}9 \cdot (E[1] - E[\text{fakulo}])$$

estas nomita „didaktika informacio“, ĉar temas pri la parto de la instruaĵinformacio I ankoraŭ ne akirita, kies lernado do estas plifaciligebla kaj plifaciligenda per didaktikaj rimedoj.

Menciendas, ke en la praktiko malfacilas senpere determini la instruaĵinformacion I laŭ (4) aŭ (7) - kaj, sekve, apliki la formulojn (11) kaj (12) - pro tio, ke ja „ideala fakulo“ normale estas facile trovebla, sed nur malfacile „ideala laiko“. Necesas konstrui respondselektigan teston pri L kaj determini la (ne)kompetentecon de lernontoj je tempopunkto 1, je kiuj ili eble estas pli-malpli laikoj. Se la nekompetenteco pro antaŭkonoj akiritaj antaŭ la instrusituacio estas nur $u < 1$, tiam estas ankoraŭ lernebla ne plu la tuta instruaĵinformacio, sed nur la ne jam akirita parto $u_1 = \hat{W}$ (la didaktika informacio). El (14b) do sekvas

$$(14c)\ I = 2(F[1] - F([\text{fakulo}]) / u = 3{,}9(E[1] - E[\text{fakulo}]) / u$$

Per tio estas aplikebla la formulo (10) por determini por ĉiuj lernantoj la respektivajn nekompetentecojn je la diversaj tempopunktoj.

2.6 Rilatigo al la lerntempo

Por pritaksi la lernprogreson aŭ klerecinkrementon aŭ Weltnerinformacion (didaktikan transinformacion) inter la tempopunktoj 1 kaj 2 de lernado plifaciligata per instruado, do por prijuĝi la kvaliton de la instrusituacio, necesas konsideri la tempodaŭron d kaj la maksimumon, kiun la lernanto povus akiri dum ĝi. Por la psikostrukturo de la homo (Frank, 1999, p. 31) tiu maksimumo estas deduktebla el la funkcioj de la forgesado (tie p. 30), de la lernado (tie pj 43, 105 - 115, 121, 130 - 131), kaj de la aĝdependeco de la lernkapablo (tie p 82). Ni povas ignori ĉi tie la forgesadon dum ne tro longa daŭro d de la instrusituacio kaj koncentriĝi al la limigita lernrapideco.

La mezuma lernrapidceo C_v estas funkcio de la aĝo A. Por simpligi la enkalkulon de ĉi tiu fenomeno, ni ne postulas enmeti la aĝon per la klavaro de la komputilo, sed deiras de tri aĝintervaloj: ĝis la 14a vivjaro ni supozas C_v = 0,5 bit/sek, inter la 14a kaj la 30a vivjaro la maksimumon, t.e. 0,7 bit/sek, kaj por pli alta aĝo 0,6 bit/sek.

Sen konsideri forgesadon kaj tempoperdon pro senutilaj ripetoj (kazo de lernstirado, kiu ja estas principe evitebla en la perkomputila instruado de unuopaj lernantoj) eblas do lerni dum la tempo d maksimume la informacion

$$(15a)\ W(\text{opt}) = C_v \cdot d$$

kaj por lerni la didaktikan transinformacion W oni bezonas tial kaj pro (14a) minimume la tempon

$$(15b)\ \begin{aligned} T_{\min} &= W / C_v = 2(F[1] - F[2]) / C_v \\ &= 3{,}9(E[1] - E[2]) / C_v \end{aligned}$$

La pritakso de la kvalito de la instrusituacio do devas kompari $T_{\min}$ kun d.

La plej simpla konsidero estas, kalkuli kiel „efikon“ la procentaĵon de la reala lerntempo d, kiu estus minimume bezonata:

$$(16a)\ \begin{aligned} \text{efiko 1} &:= T_{\min} / d = 2(F[1] - F[2]) / dC_v \\ &= 3{,}9(E[1] - E[2]) / dC_v = W / dC_v \\ &= \Delta p \cdot I / dC_v = (\Delta p \cdot I / d) / (C_v \cdot d / d) \end{aligned}$$

Tio estas evidente la „pedagogia povumo“ $\Delta p\ /\ d$ dividite per ties maksimumo, do la „relativa pedagogia povumo“.

Tamen, se la lernado ne povas progresi laŭ konstanta rapideco, alivorte: se la lernkurbo ne estas rekta linio, tiam $\Delta p\ /\ d$ ne povas esti konstanta. Por la ekstrema kazo de pura lernstirado Frank (1999, p 124) tial rilatigas (anstataŭ la lernprogreso Δp) la logaritmon de la klerecinkremento w al la lerndaŭro d,

$$(16b)\ \text{efiko 2:} = \ln w / d$$

(ln - parolu „logaritmus naturalis de“ - estas la logaritmo je bazo de la Eŭlera nombro e = 2,718...) kaj komparas la rezulton (Frank nomas ĝin „lernfacileco en la instrusituacio“) poste kun ties maksimumo, do kun C_v/I, tiel ricevante (proksimume) sian „efikancon“.

$$(16c)\ \eta\ (= \text{efiko 3}): = \text{efiko 2} / \text{maksimuma efiko 2} = \ln w / (dC_v/I)$$

Kaze ke je la tempopunkto 1 la kompetenteco ankoraŭ estas proksimume 0 kaj kaze ke d estas malgranda, nia tria mezuro de la efiko egalas proksimume al nia unua.

2.7 Aliaj mezuroj

Plua mezuro povus esti, kalkuli laŭprocente la kreskon de la lernita informacio, ĉu rilate al la informacio jam komence sciita:

$$(17a)\ \text{efiko 4:} = W / p(1)I$$

(kiu tamen ne estus laŭprocenta mezuro kaj fariĝas senfine granda, se p(1) = 0), ĉu rilate la instruaĵinformacion I:

$$(17b)\ \text{efiko 5:} = W/I$$

(kiu ja estas laŭprocenta mezuro, sed ne respektas la aĝdependan lernrapidecon)

Dum la lernado ŝanĝiĝas ankaŭ aliaj mezuroj, kiuj estas facile aplikeblaj, ekzemple la (subjektiva) koncizeco, la (subjektiva) redundanco kaj konvene difinebla *grado* de la informacio, kiun la lernanto havas pri la teksto.

La koncizeco de teksto (ekz. de BT) estas ĝia enhavo je informacio kompare kun la maksimuma informacio, kiun samlonga teksto (longeco N) el signoj el la sama repertuaro de (ekz. 32 diversaj) signotipoj povus havi:

$$(18)\ k: = NH / NH_{max} = NH / 5N$$
$$= H/5 = 2f/5 = (3{,}9e - 0{,}08) / 5$$

Antaŭ la lernado pli da eraroj estas faritaj ol post la lernado, do f kaj e malkreskas, sekve ankaŭ la (subjektiva) koncizeco de BT.

La redundanco laŭdifine estas la komplemento de la koncizeco:

$$(19)\ r = 1 - k,$$

tiel, ke la (subjektiva) redundanco de BT kreskas pro la lernprocezo.

Ni rekomendas enkonduki kiel pli trafajn mezurojn la „semantikan koncizecon" kaj la „semantikan redundancon". BT enhavas maksimume tiom da semantika informacio, kiom ĝi enhavas subjektivan informacion por laiko. Tiun maksimumon, kiu estas siavice maksimume $5N$, BT atingas, se ĝi enhavas neniom da informacio por la fakulo, do neniom da estetika informacio. La semantika informacio de BT ankoraŭ lernenda de lernanto estas la didaktika informacio $\hat{W}$. La (dum la lernprogreso malkreskanta) subjektiva semantika koncizeco do estas difinebla per

$$(20)\ k_{sem}: = \hat{W} / 5N = 2(f - f[\text{fakulo}])/5 = 3{,}9(e - e[\text{fakulo}])/5$$

La komplemento $r_{sem} = 1 - k_{sem}$, kiun ni nomas la (subjektiva) semantika redundanco, sekve kreskas dum la lernado.

Kreskas dum lernado ankaŭ alia, facile kalkulebla valoro, kiun ni volas nomi la *„grado de la pri BT akirita informacio"*

$$(21)\ g = Z / N = (N - E)/N = 1 - e$$

Temas tutsimple pri la procentaĵo de la tekstsignoj ĝuste divenitaj, kun kiu laŭ (18) kaj (19) la redundanco lineare kreskas.

2.8 Aplikado de la Frank-Wagner-kurboj

La procentaĵo de ĝustaj respondoj en testo povas konkludigi al mistakso de la kompetenteco de esplorito pro du hazardaĵoj:

1) La testo kontrolas la scion nur de hazarda specimeno de la instruaĵo L, pri kiu la kompetenteco povas esti pli alta (risko de la ekzamenanto) aŭ malpli alta (risko de la kandidato) ol pri la tuta instruaĵo.

2) La hazardaj respondselektoj en la kazoj de nescio de la ĝusta respondo povas esti ĝustaj pli ofte aŭ malpli ofte ol $(1-p)b$; sekve la kalkulo povas konduki al tro granda (risko de la ekzamenanto) resp. tro malgranda (risko de la kandidato) supozata kompetenteco.

Frank kaj Wagner (1982) starigis grafikaĵojn, el kiuj eblas ekscii la probablon de tia mistakso de la kompetenteco depende de la diversaj parametroj.

La komputilsistemo de ni evoluigita laboras per la valoro $b = 1/3$ de bonŝanco kaj aprobas, se la eraroj ne superas la kriterion 50%. (Sen granda problemo eblus ankaŭ elekti per menuo aliajn valorojn, do alian Frank-Wagner-kurbon.) Novaĵo de nia metodo estas, ke ni anstataŭis la kutimajn, respondselektigajn testdemandojn per la t.n. „bazaj vortoj", kiuj troviĝas laŭ la difino de la *w-t*-didaktiko en BT, t.e. la vortoj, kiuj aperas en BT sen esti „trivialaj". Kalkulante per $b = 1/3$ ni supozas, ke esplorato, kiu ne scias la bazan vorton, kiu troviĝas je certa loko de BT, ne nepre eraras pri almenaŭ unu de siaj signoj, sed tamen laŭ probablo 1/3 bonŝance divenas ĝuste.

Pere de la menuo, la instruisto elektas inter la diversaj kurboj de Frank-Wagner la pli taŭgan laŭ la dezirata (por la esplorato) kompetentecgrado (tion oni atingis adaptante la kurbon al matematika formulo, interpretebla de la komputilo).

3. Funkciado de la evoluigita sistemo

La instruprocezo konsistas el la didaktika algoritmo starigita de la instruisto, kiam li ellaboras taŭgan bazan tekston, demandojn de la testo kaj fiksas la kompetentecgradon, kiun li celas por la lernantoj pri la instruaĵo. La lernantoj lernas pere de la legado kaj interpretado de la baza teksto kaj sekvantaj lernofertoj regulataj de la komputilo, laŭ la atingita lernsukceso. La sistemo estas instru-lern-sistemo aplikebla al malsamaj instruaĵoj.

La komputilsistemo konsistas el 8 funkcioj kaj elmetas per la ekrano 17 rezultojn.

1. La Baza Teksto BT verkita de la docento (instruisto) estas enmetata. Ĝi devas havi simplan strukturon kaj esti reduktita al 32 tajpsignoj, al kiuj apartenas la precipaj literoj de la hispana alfabeto kaj la interspaco.
2. La sistemo nombras la N tekstsignojn de BT kaj ties W vortojn.
3. Estas enmetataj la pripersonaj datumoj de la lernanto.
4. La lernanto konas la tutan bazan tekston, kiun li ricevas de la komputilo dum la unua prezentado. (Li decidas, kiom da fojoj li legos la tekston.) Poste, surbaze de tiu scio, li faras la diventeston, literon post litero. De ĉi tie la komputilo regulas la procezon laŭ la rezultoj. Laŭ la decido de la lernanto la komputilo aŭ demandas de li, kiu estas la sekvanta tekstsigno, aŭ elektigas ĝin el la eksplicite prezentita repertuaro. Aperas sur la ekrano la ĝusta komenco (t.e. la ĝusta unua litero resp., poste, la ĝusta signoĉeno, per kiu la teksto komencas). Tiu proceduro estas kontinuata ĝis kiam BT komplete troviĝas sur la ekrano. (Dume la esplorito agas laŭ la koncernaj statoj de sia memoro, de la jam starigita hierarkio de supersignoj kaj de la jam okazinta informeca akomodado.)
5. Interne la komputilo nombras la erarojn E kaj trafojn Z kaj kalkulas laŭ la formuloj starigitaj en ĉap. 2 instruaĵinformacion, koncizecon kaj redundancon de BT, ties subjektivan informacion por la lernanto kaj la kompetentecon de la lernanto.

6. La komputilo demandas de la instruisto la aĝon de la lernanto kaj la nombron da bazaj vortoj en BT.

7. Surbaze de la storitaj datumoj la komputilo kontrolas surbaze de la Frank-Wagner-kurboj la probablon, ke la lernanto sukcese lernis, kaj prognozas la tempon ankoraŭ bezonatan por lerni la reston de la instruaĵinformacio.

8. La komputilo purigas la ekranon kaj prezentas per ĝi al la instruisto 17 rezultojn en la jena sinsekvo: (1) N, (2) W, (3) Z, (4) E, (5) H en bit/signo, (6) i(BT) (en bit) tekstinformacio por laiko, (7) i(BT) (en bit) por la esplorito, (8) k (en %), (9) r (en %), (10) g (en %), (11) p (en %), (12) kompetenteco en bit, t.e. pI, (13) sukcesprobablo (en %) laŭ la Frank-Wagner-kurbo, (14) bezonota tempo por lerni la reston (en sek), (15) i(BT) por la esplorito (en bit), kalkulite laŭ la metodo de Weltner, (16) lernprogreso dum la lerntempo (la komputilo storas ĉiun elementon, do ĝi povas kompari), (17) „laŭprocenta klerecinkremento w" (la rilaton inter „realo" kaj „idealo").

La komputilo pro eventuala deziro de la lernanto prezentas denove la lernelementojn de la instruaĵo, kiujn la lernanto ankoraŭ ne regas. Krome la komputilo storas en arkivon la datumojn de la lernanto kaj la rezultojn de ilia statistika pritrakto.

Literaturo

Barandovská, V. (Hrsg.) (6-7, 1993, 10, 1998), **Lánská, J.** (8, 1993, 9, 1995), **Meder/Schmid** (Hrsg.) (1-4, 1973, 5, 1974), **Pinter, A. M.** (Hrsg.) (11, 1999): *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko*, 11 vol., Stuttgart, Berlin, Paderborn, Bratislava, Praha 1973 - 1999.

Feretti, J.L., Balzer, F., Carena, J.C.: *El calculo matematico y la cibernetica aplicada a la pedagogia.* Traducción, recopilación y adaptación de curso didactico de Helmar Frank en la Facultad de Ciencias Bioquímicas y Farmacéuticas de la Universidad Nacional de Rosario en Marzo 1984. Asociación Rosarina de pedagogia cibernetica, Rosario, 1985

Frank, H. (1959a): *Grundlagenprobleme der Informationsästhetik und erste Anwendung auf die Mime pure.* Disertaĵo, Stuttgart, 1959a. (Represita en Meder/Schmid, vol. 5, 1974)

Frank, H. (1959b): *Théorie informationnelle de la réalisation et perception dans l'art du mime.* Cahiers d'Etudes de Radio-Télévision 24, 1959b. (Represita en Meder/Schmid, vol. 3, 1973)

Frank, H. (1962, 2a eld. 1969): *Kybernetische Grundlagen der Pädagogik.* Agis, Baden-Baden, & Gauthier-Villars, Paris, 1962; 2-a eldono Agis, Baden-Baden, & Kohlhammer, Stuttgart, 1969. (1-a eldono represita en Barandovská, vol. 7, 1993)

Frank, H. (1964): *Kybernetische Betrachtungen über Lehr- und Lernprozesse.* pl 1, 1964, p 22 - 31. (Represita en Meder/Schmid, vol. 1, 1973).

Frank, H. (1966): *Aspects cybernétiques de l'apprentissage et de l'enseignement.* Cybernética 3, 1966, p 179 - 198. (Franca traduko de Frank, 1964, represita en Meder/Schmid, vol. 3, 1973.)

Frank, H. (1984): *Propedeŭtiko de la klerigscienco prospektiva / Vorkurs zur Prospektiven Bildungswissenschaft.* Narr, Tübingen, 1984. (Represita en Barandovská, vol. 7, 1993)

Frank, H. (1995): *Kybernetische und normative Kriterien stattgefundenen Lernens.* En: Chrdle (red.): Soucasné trendy ve vzdělávání. KAVA-PECH, Dobrichovice/Praha, 1995, p 20 - 25. (Represita en Pinter, vol. 11, 1999.)

Frank, H. (1996, 2-a eld. 1999): *Klerigkibernetiko / Bildungskybernetik.* KoPäd, München, 1996 (2a eldono, 1999, represita en Pinter, vol. 11, 1999.)

Frank, H.G., / Meder, B.S. (1971): *Einführung in die kybernetische Pädagogik.* dtv, München, 1971. (Represita en Meder / Schmid, vol. 5, 1974)

Frank, H.G., / Meder, B.S. (1976): *Introducción a la pedagogía cibernética.* Troquel, Buenos Aires, 1976. (Hispana traduko de Frank / Meder, 1971)

Frank, H. / Wagner, H. (1982): *Ein graphisches Verfahren zur Beurteilung von Tests und Prüfungen mit Auswahlantworten.* GrKG /Humankybernetik 23/4, 1982, 161 - 170. (Represita en Barandovská, vol. 6, 1993.)

Shannon, C. E. (1948): *A mathematical theory of communication.* Bell System Technical Journal 27, 1948, p 379 - 423, 623 - 659. (Represita en Shannon / Weaver, *The mathematical theory of communication*, Urbana, 1949)

Weltner, K. (1966): *Der Shannonsche Ratetest in der Praxis der Programmierten Instruktion.* En: H.Frank (red.): Lehrmaschinen in kybernetischer und pädagogischer Sicht, vol. 4, Klett, Stuttgart, & Oldenbourg, München, 1966, p 40 - 53. (Represita en Pinter, vol. 11, 1999.)

Weltner, K. (1970): *Informationstheorie und Erziehungswissenschaft.* Schnelle, Quickborn, 1970. (Represita en Pinter, vol. 11, 1999.)

Ricevita 1999-10-27 (en prilaborita formo: 2000-02-02)

Adreso de la aŭtoro: Prof. Ing. José Luis Albano, Rioja 2679, RA – 2000 Rosario - Argentina (albano3@satlink.com); Fax: 0054-341-4408150

Computer based controling of learning, competence and effiency by application of the WELTNER-method (summary)

We have made our work on the base of cybernetic-pedagogical and mathematical theories of H. Frank, K. Weltner H. Wagner and others. The formal cybernetic research of learning processes is, nowadays, one of the main aims of this science. We have applied the computer to evaluate the starting state, the learning and the educational increment of the learner and the didactical algorithm, rebounding the feed-back of the process of instruction /learning. We had a learn-automaton to our disposition, which checks the grade of progress and the reaching of acceptability grades of the reached knowledge.

Contrôle de l'apprentissage, de la compétence et de l'efficacité par application automatique de la méthode de Weltner (résumé)

Notre travail est fait sur la base des recherches pédagogiques – cybernétiques et mathématiques, faites par H. Frank, K. Weltner, H. Wagner et autres. La formelle recherche cybernétique des processus d'apprentissage est maintenant un des buts les plus graves de cette science. Nous avons appliqué l'ordinateur pour apprécier l'état de commencement, l' apprentissage et l'incrément d' instruction d' un élève et d'un algorithme didactique, en produisant une couplage réactive du processus de l'instruction/apprentissage. On a mis à la disposition un automate pour apprendre, qui contrôle le grade de progrès et la conquête des grades d'acceptabilité de la connaissance apprise.

Rechnergestützte Kontrolle von Lernen, Kompetenz und Wirkung durch Anwendung des WELTNER-Verfahrens (Knapptext)

Unsere Arbeit baut auf den bildungskybernetischen und mathematischen Forschungsergebnissen von H. Frank, K. Weltner, H. Wagner u.a. auf. Die formalkybernetische Erforschung der Lernprozesse ist gegenwärtig ein Hauptziel dieser Wissenschaft. Wir benutzten den Rechner zur Abschätzung von Anfangszustand, Lernfortschritt und Bildungsinkrement des Lerners und zur Beurteilung des didaktischen Algorithmus durch Rückkoppelung des Lehr-Lern-Prozesses. Damit wurde ein lernender Automat verfügbar, der den Grad des Fortschritts und das Erreichen von Akzeptanzgraden der erworbenen Kenntnisse regelt.

Pri la senco de verbaj finaĵoj, aŭ: Dumnokte la rektoro ne rektoras

von Helmut WELGER, Marburg (D)

En la artikolo „Denkanstößiges zum Problem der internationalen Kommunikation" (Helmar Frank 1992, en: Kybernetische Pädagogik/Klerigkibernetiko, vol. 6, p. 1039) sub punkto 5 troviĝas formoj kiel „la teoremo pruvitas" kaj „li rektoras". Tiuj formoj, kvankam ne malpermesitaj, estas problemaj, ĉar la finaĵoj „-as", „-is" kaj „-os" en la Fundamenta Esperanto *ne* signifas „estas", „estis" kaj „estos". Neniu povas devigi vin, sekvi la gramatikajn, stilajn kaj instituciajn regulojn de la Fundamento; sed se vi ne faras tion, vi ludas alian „lingvoludon" ol laŭfundamentan Esperanton. Ludi futbalon laŭ manpilkaj reguloj ne estas krimo, sed - manpilko.

En LR 119 Zamenhof (1962) skribis jenan ofte misinterpretatan tekston: „La formoj „amatas", „amitas" ktp. anstataŭ „estas amata", „estas amita", per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia *propra* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se „as", „is" k.t.p. signifus „estas", „estis"; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo „esti", tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas."

Ke formoj kiel „amatas", „amitas" per si mem ne prezentus ian rompon de la lingvo, tio ja sekvas el la principo, ke ĉia vorto en nia lingvo povas esti kunmetata kun ĉia alia. Ankaŭ sufiksoj estas „vortoj" en tiu senco.- Tamen la *signifo* de tiaj formoj estas problema, ĉar laŭ la ĝisnunaj reguloj de la lingvo „as", „is" k.t.p. *ne* signifas „estas", „estis". Krome, „as" kaj „is" kunportas la ideon de ia aktiveco; kaj tiu ideo estas algluita al la kontraŭa ideo de la pasivaj participoj. „Li *estas* amata" ĉefe esprimas, el kiu tempa perspektivo estu rigardata tio, kion la participo eldiras, dum „li amat*as*" emfazas, ke tiu pasiva amateco enhavas en si ion aktivan. „Li amatas" tial signifus ne simple „li estas amata", sed povus elvoki ion kiel „li okupiĝas pri amateco", „li travivas/ĝuas amatecon" aŭ eĉ „li banas sin en amateco" k.s. Sed tiaj sencnuancoj tre malofte estas bezonataj, kaj ili estas pli teoriaj ol praktike senteblaj.

Precipe la rimarko de Zamenhof, ke „pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo „esti"", kondukis multajn legantojn al la erara opinio, ke la lingvouzo mem iam povus doni tiun ĉi signifon al la verbaj finaĵoj. Sed ĉar la participaj sufiksoj apartenas al la Fundamenta Gramatiko, tial neniel la lingvouzo, sed nur la Akademio rajtas doni novan sencon al ili. Oni priatentu, ke Zamenhof skribis LR 119 (Zamenhof 1962) en la jaro 1907, kiam li okupiĝis pri reformoj kaj neologismoj. „Neologismoj" estas, laŭ la difino de Zamenhof, *radikoj sinonimaj al oficialaj radikoj.* Oficialaj radikoj estas tiuj, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro aŭ en unu el la Oficialaj Aldonoj al la Fundamento. Surbaze de la instituciaj reguloj - precipe A8.1 - de la Fundamento (Zamenhof 1963) nur „aŭtoritata centra institucio" - t.e. siatempe la Lingva Komitato, kaj nuntempe nur la Akademio de Esperanto rajtas enkonduki tiajn sinonimojn. Zamenhof en sia Cirkulero pri neologismoj 1906 (PV 06-115) proponis al la Lingva Komitato: *„Anstataŭ „esti" kaj ĉiuj ĝiaj formoj („estas, estis, estos, estu, estanta" k.t.p.) estas uzata „i" kun ĉiuj ĝiaj formoj („as, is, os, u, anta" k.t.p.)."* Tiu propono estis antaŭ ĉio ia „oferdono al la dio de malpaco" (Zamenhof) en la specifa situacio antaŭ la Ido-krizo (vd. ankaŭ PV 07-133). La Komitato malakceptis tiun proponon; do ĝi ne fari ĝis valida. Kaj ĝuste tia la norma situacio restis ĝis hodiaŭ.

El ĉio ĉi tio sekvas, ke *ĝenerale estas malkonsilinde (kvankam ne malpermesite) uzi formojn kiel „amatas", „amitas" k.t.p.*, kaj tio restos valida ĝis tiu tempo, kiam la Akademio estos realiginta la cititan proponon de Zamenhof. Laŭ mi, ĝi neniam faru tion. Kaj kial mi opinias ĉi tion? Plene kaj ĝisfine trapensu, kio logike okazus, se tiu propono fari ĝus valida ĝenerala regulo: Ĝi enkondukus plian, ofte neoportunan sencon en ĉiujn Esperanto-verbojn kaj per tio komplete kaj sisteme rompus la ĝisnunan linvouzon. Ekz. marteli tiam nepre signifus: esti martelo, krimi: esti krimo; koncerti: esti koncerto; ktp. Tial ni restu ĉe la nuna sistemo.

Kaj kio pri „rektori" k.s.? Nu, laŭ la diritaj ĝisnunaj reguloj ĝi ne signifas nur „esti rektoro", sed „agi rektore" k.s. - Jacques Chirac, la franca prezidento, iam ŝerce diris: „Ĉefo devas ĉefi." Chirac volis esprimi per tio, ke ne sufiĉas nur *esti* ĉefo, sed ke necesas *agi* kiel ĉefo. Kaj la rektoro ĉiam estas rektoro, eĉ dormante li ne ĉesas *esti* rektoro, sed dormante li ne rektoras. Nur deĵorante li rektoras. Almenaŭ, se vi ludas la lingvoludon „Fundamenta Esperanto".

Literaturo:

Frank, H.: *Denkanstößiges zum Schlüsselproblem der internationalen Kommunikation.* Institut für Kybernetik der AIS, Paderborn 1992

Zamenhof, L.L.: *Lingvaj respondoj. Konsiloj kaj oipinioj pri Esperanto.* Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande 1962

Zamenhof, L.L.: Fundamento de Esperanto. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande 1963

Zamenhof, L.L.: *Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof kajero 7.* Ludovikito, Kioto 1980

Eingegangen 2000-02-12

Anschrift des Verfassers: RA, Dipl.-Psych. Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-35037 Marburg

8. Prager Konferenz über Kybernetische Pädagogik

PKKP8 findet vom *12. bis 14. Juni 2000* als kybernetischer Programmteil von SUS 22, der 4. tschechischen AIS-Tagung (2000-06-09/15), an der ***Universität Hradec Králové (CZ)*** statt; Näheres findet sich in GrKG/H 40/3, 133 – 135). Bis 4. Februar wurden die folgenden Vorträge angenommen:

1. Sektion (*Europäische Bildungstechnologie - Retrospektiven und Perspektiven*): Beran, Z. (CZ): *Einfluss der Sprachqualität auf die Lehrleichtigkeit einer Sprache* (tschechisch); Leustik, H. (A): *Telekooperative Seminare*; Poláková, E. (SK): *Bildungstechnologie in der Slowakei* (slowakisch), Schmidt, M. (D): *Erinnerungen an Hermann Schmidt*; Vítek, M. (CZ): *Systemingenieurwesen im tschechischen Schulwesen* (tsch.); Masek, J. (CZ): *Some topical questions of educational technology in the knowledge age;* Vojácek, J. (CZ): *Komunikado en la tria jarmilo.*

2. Sektion (*Kybernetische Modelle, Systemansatz und Pilotprojekte für Anwendungen der Bildungstechnologie*): Hilgers, R. (D): *Auswahl und Sequenzierung von Lehrstoffen bei begrenzter Lernzeit*; Hynek, J. (CZ): *Internet ist nicht alles* (tsch.); Kanig, G. (D): *Psychometrische Modelle der Diagnostik im Kontext der Bildungskybernetik*; Poláková, E. (SK): *Projekto KKKK*; Zlatník, C. (CZ): *Adaptivität von Lehrprogrammen* (tsch.); Albert, A. (SK): *Lösung von Konstruktionsaufgaben mit Algorithmus* (slow.); Gnoth, M. (SK): *Anteil von Direktivem und Nichtdirektivem bei der unterrichtlichen Kommunikation* (slow.); Semrádová, I. (CZ): *Potential des Kenntnismanagements in der Hochschulbildung* (tsch.); Sipos, L. (SK): *Pädagogische Aspekte der Multimedia-Anwendung* (slow.)

3. Sektion (*Erfahrungen mit der Bildungstechnologie in verschiedenen Bildungsbereichen*):

Untersektion *Bildungstechnologie durch Internetz:* Biederman, H. (CZ): *Erzeugung hypermedialer Dokumente für den Chemieunterricht* (tsch.); Cernochová, M. (CZ): *Communication in video-conferencing in teacher training*; Fojtík, R. (CZ): *Internetz als aktives Lehrelement* (tsch.), Fulier, J. (SK): *Internetz al neues Multimedium für die selbständige Arbeit von Mathematikstudenten* (slow.); Issing, L. (D): *Evolution des Lernens durch Multimedia/Internetz*; Jehlicka, V. (CZ): *Benutzung des Internetzes im Programmierunterricht* (tsch.); Lustigová, Z., Zelenda, S. (CZ): *Virtual learning environments - general view and tendencies*, Nilsson, S. (S): *Senior Internet Package*; Pluskal, D. (CZ): *Intranet F EOS und Erfahrungen mit Anwendungen von Bildungstechnologien* (tsch.); Sinor, S. (CZ): *Online support in teacher training;* Snásel, V. (CZ): *Bildungsnutzung der Fulltext-Systeme* (tsch.); Zelenka, J. (CZ): *Das Internetz als aktiver Element des Bildungsprozesses* (tsch.).

Untersektion *Weiterbildung und Fernunterricht*: Burianová, E. (CZ): *Weiterbildung von Pädagogen* (tsch.); Kozel, T. (CZ): *Mobilobjekte im Fernunterricht* (tsch.); Telnarová, Z. (CZ): *Databasis-Unterstützung des Fernunterrichts* (tsch.); Tesar, J. (CZ): *Virtuelles Laboratorium im System einer Weiterbildung von Physiklehrern* (tsch.); Turcáni, M. (SK): *Möglichkeiten des Fernunterrichts im Fach Informatik* (slow.); Bílek, M. (CZ): *Internetz in der Weiterbildung der Chemielehrer* (tsch.).

Untersektion *Bildungstechnologien und Fachdidaktiken*: Dosedla, Z. (CZ): *Systeme im Curriculum der Grundbildung* (tsch.); Halbych, J. (CZ): *Herstellung von Hypermedia-Dokumenten für den Chemieunterricht* (tsch.); Horáková, G., Starecková, A. (SK): *Ein alternativer Unterricht der Wahrscheinlichkeitstheorie* (slow.); Kapounová, J. (CZ): *Studium der technischen Erziehung an der pädagogischen Fakultät* (tsch.); Korcáková, J. (CZ): *Bedeutung der Grammatik im Fremdsprachenunterricht* (tsch.); Kudelka, M. (CZ): *Visualisierung von Algorithmen und ihre unterrichtliche Nutzung* (tsch.); Solárová, M. (CZ): *Möglichkeiten der Rechner-Lehrprogramme im Chemieunterricht an Gymnasien* (tsch.); Spulák, F. (CZ): *Energie*, Vanícek, J. (CZ): *Curricula-Aspekte der Technologiebenutzung im Geometrieunterricht* (tsch.); Zelenický, L. (SK): *Physikunterricht im Spektrum neuer Technologien* (slow.)

Untersektion *ICT im Unterricht – Allgemeinprobleme*: Frantová, P. (SK): *Kalkültechnik und pädagogisches Soft als universale didaktische Mittel* (slow.); Hnilicová, J. (CZ): *Videokomunikation ohne Worte* (tsch.); Julià, P. (E): *Learning, computers and programs - a précis*; Konícek, L., Kricfalusi, D., Mechlová, E. (CZ); *ICT-Anwendung bei der prägraduierten Vorbereitung von Physik- und Chemielehrer* (tsch.); Pejsar, Z. (CZ): *Einfluss von Rechnerspielen auf die Denkentwicklung der Kinder* (tsch.); Pivarciová, E. (SK): *Multimedia-Unterricht* (slow.); Rychtera, J. (CZ): *Ein On-line Laboratorium zur Unterstützung des pädagogischen Praktikums der Lehramtstudenten* (tsch.); Soukup, J. (CZ): *Anfangen muss man sofort* (tsch.); Svarc, S. (SK): *Reduzierter rechnerunterstützter Unterricht: Ergebnisse einer pädagogichen Forschung* (slow.).

Weitere Anmeldungen und Rückfragen *zu PKKP8* bearbeitet ***Dozent Dr. habil. Martin Bílek, PdF VŠP, V. Nejedlého 573, CZ-50003 Hradec Králové.*** Netzpost: **Martin.Bilek@vsp.cz**, *zum übrigen SUS-Programm* ADoc. Mag. Joanna Lewoc, Netzpost: **blewol@hrz.upb.de**.

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". – Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.

Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.

Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. – En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). – Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". – En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).

Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.

Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". – Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.

A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.

To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.

Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").

En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).

Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.

En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.